

SVISA ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

N-ro 4/1994

JULIO-AŬGUSTO

PENTEKOSTAJ TAGOJ EN LA NEŬSATELA ĴURASO

Alsuprante al la monto Pouillères en postplava vetero la sabato 21.5.

Radka Olto Andrée Hanny Nicole Hans Fritz Berthe Bogusław Aneta Grazyna



Alidona

25

Sabate la 21-an de majo kolektiĝis 15 geesperantistoj (inter ili rei esperantoparolantaj infanoj) en la KULTURA CENTRO ESPERANTISTA/KCE. La programo promesis migradojn en la bela kaj pitoreska regiono de la neŭŝatela ĵuraso.

Je la 15.00h ni ekmarŝis al la unua entrepreno. La vetero ne estis aparte bela, sed por la marŝado la temperaturo estis agrabla. Proksime de KCE komenciĝis la suprenirado ĝis proksimume 1500 m super la maro. Plej supre ni ĝuis belan panoramon. Post sufiĉe longa migrado subite forta pluvo akompanis nin hejmen! Tamen, ves-

pere ni gaje kunsidis kaj ĉe bona rakledo la malseka duŝo estis baldaŭ forgesita. Poste Claude Gacond montris belajn lumbildojn pri floroj.

Pentekostdimanĉe ni denove estis survoje en alia regiono. La alveturo okazis per aŭtoj. Post eble trihora marŝado tra herbejoj kun florantaj gencianoj kaj orkideoj, kaj tra bonodoraj arbaroj ni atingis la belvidejon "Belvedere", vidalvide de "Creux du Van". Mirinde bela panoramo prezentiĝis antaŭ ni-aj okuloj.

Du pluaj belvidejoj estis en la programo, kiuj montriĝis ne malpli belaj.



14

*Ĉe la dua belvidejo Andrée prezentas florojn
Vido al la monto Creux-du-Van kaj al la gorĝo de la rivero Arceuse*

Ni ĝuis la rigardon al la sub ni situantaj regionoj. Reatinginte la valon, ni finis la aventuron de tiu-ĉi tago, ĉe bona tagmanĝo. En KCE la tuta grupo festis la vesperon ĉe bonega fonduo, preparita de Claude Gacond.

Glaseto da blanka vino el la regiono estis "la punkteto sur la i". La distra vespero restas en bona rememoro.

Venis la **lasta tago**. La gvidantoj, gesinjoj-roj Gacond, organizis la lundan antaŭtagmezon denove perfekte. En "Les Ponts de Martel" ni vizitis fromaĝejon, kie oni povis vidi la produktadon de la fromaĝo "Gruyere". Vere impresplena laboro.

La dua parto de la antaŭtagmezo estis ankaŭ granda surprizo. En granda kruta arbaro ni miris pri la multaj statuoj skulptitaj el trunkorestaĵoj de faligitaj arboj. Anstataŭ plene forigi la malsanajn arbojn, iu arbarposedanto ekhavis la ideon skulpti el la trunkorestaĵoj, kiujn oni lasis stari en la tero, diversaspektantajn lignoskulptaĵojn. Estis ekzemple leono, delfeno, drako, homoj el la historia pratempo ktp. Vere, tiu arbaro aspektas kiel kulturhistoria muzeo. Malgraŭ la iom peniga vojeto oni baldaŭ forgesis la streĉigan iradon. Estis unika travivaĵo.

Post bona tagmanĝo en proksima restoracio la pentekosta semajnfino finiĝis kaj ni disiris kun ĝojplena koro. Grandan dankon al la du perfektaj gvidantoj.

Ĝis revido alian fojon



49

SPECIALA EKSPOZICIO EN LA KAPELPONTO

okaze de la 3-a Komik-Festivalo en Lucerno.

Surprizeto en Esperanto

Kiel vi scias, la 18-brulis granda parto kaj ĝiaj triangulaj punta tegmento. Do, de ĉi tiuj verkoj. fermo (la 14-an oni invitis al kurso, okaze de mik-Festivalo la kopiitaj ne ankoraŭ 11 verki-Svisio kaj najbar-doj

an de aŭgusto 1993 de la ligna ponto pentraĵoj sub la ekzistas fotoj Por la remalde aprilo 94) publika konla 3-a kosciante, ke tabuloj pretaj. stoj el aj ties aj lan-



kreis cent-dekunu grandskalajn bildojn je la antaŭdonita temo "HELVETIO kaj EŬROPO": La spacveturilo Eŭropo serĉas vagulojn en la kosmo. Tio ĉi estis la temo de la juna lucerna grafikisto Tino ROELLIN. Li ne estas Esperantisto. Tamen ŝajnas, ke komuna interkomprenilo okupis lin. ROELLIN skribumis siajn bildojn per Esperanto, ĉar li scias, ke ties verkisto estis eŭropano. -LES-

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

PROGRAMO EN JULIO KAJ Aŭgusto 1994

1. 10-a ĝis 15-a de julio
2. 17-a ĝis 22-a de julio
3. 24-a ĝis 29-a de julio
4. 31-a de julio ĝis 5-a de aŭgusto

Lingvostudo kaj feria restado por komencantoj kaj progresantoj

kun **Anikó Gönye** kaj **Melinda Birges**, studentinoj de la universitato "Eötvös Loránd" Budapeŝto.

Tiuj-ĉi kursoj celas komencantojn kaj progresantojn, kiuj deziras bone lerni Esperanton kaj profiti la ĉeeston de aliaj Esperantistoj por tuj ekuzi la lingvon. En aparta klaso la kursanoj lernos per diversaj instruteknikoj (programita, perbilda, strukturŝanĝa kaj aŭdvida).

Komunaj manĝoj, vesperaj programoj, ekskursoj kaj diskutadoj enkadrigas tiujn 4 studsemajnojn.

oo0oo

Jen memorigo pri:

TUTMONDA KONGRESO DE LA MONDFEDERALISTOJ

Tiu kongreso okazos en Glarus de la 27-a ĝis la 31-a de julio 1994. Ĝi kunigos homojn el la tuta mondo en Svislando. Ĉar tiu movado konsistas el homoj konsciaj pri homara familio demokrata, ni devus varbadi ĉe ili pri Esperanto.

Kiu povus alporti varbilojn al Glarus kaj eventuale deĵori dum tiu kongreso kelkajn horojn tage? Se vi pretus transpreni tiun taskon, anoncu vin al prezidanto Claude Gaccond kaj samtempe al KCE en La Chaux-de-Fonds, ĉar tie kuŝas la varbiloj. -MG-

15-22 julio 1994:

**INTENSIVA PREPARIĜO AL EKZAMENOJ
kun prelegoj pri la metodiko de esperanto-instruado**

Kun **Katalin SMIDELIUSZ** (Hungario), instruistino pri matematiko, rusa lingvo kaj Esperanto, estrino de la Esperanto-fako en pedagogia altlernejo.

Ekzamen-prepariĝantoj povos labori kun ŝia helpo kaj pretiĝi sub ŝia gvidado. Je ilia dispono estos ankaŭ diversaj lerniloj kaj libroj. Sed ili kunportu siajn volemon, laboremon kaj vortaron! Fine de la preparperiodo okazos test-ekzameno. Alveno: 15-a de julio, vespere; kurskomenco: 16-a de julio, matene.

SEMAJNFINO: 1994 JULIO 23-24

EKZAMENOJ PRI LINGVOKAPABLO JE ELEMENTA KAJ MEZA NIVELOJ

Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) invitos al tiuj ekzamenoj ĉiujn, kiuj volos konfirmiĝi pri sia lingvokapablo kaj havi oficialan rekonon pri ĝi.

Ekzamenanto: ekzamena komisiono de ILEI.

oo0oo

SEMAJNFINO: 1994 julio 23-24

**LA ESPERANTO-KABARETO: INTER PARIZO KAJ BU-
DAPEŝTO**

Kun **d-ro giorgio silfer** (Eŭropo), doktoro pri beletro kaj modernaj lingvoj, prezidanto de "Koooperativo de Literatura Foiro", Vicprezidanto de Esperanta PEN.

Inter la du mondmilitoj manifestiĝis la ĝis nun plej sukcesa formo de originala teatro en nia lin-

gvo: kabareto. Ĉi-jare ni celebras la centan datrevenon de la naskiĝo de unu el la protagonistoj de ĉi tiu ĝenro: Raymond Schwartz (1894-1973). Sed ankaŭ Mihály Sárossy (1893-1983) kaj la amika rondo ĉirkaŭ Julio Baghy (1891-1967) en Budapeŝto grave kontribuis, paralele al la ŝvarca "Verda Kato" (kiu "testamentis" jam en 1926) kaj la "Pirata Ferdeko" en Parizo.

1 9 9 4 J U L I O 24-29

KULTURHISTORIA KAJ TURISMA SEMAJNO: KONATIĜO KUN ĴURASO

Kun **Claude Gacond**, **Andy Künzli** (Svislando), kaj aliaj vivantaj en Ĵuraso.

Ĉi-tiu unika feriosemajno havos kulturajn, historiajn kaj turismajn akcentojn. la celo estas konatiĝi kun kulture kaj nature tre interesa fenomeno: la montaro Ĵuraso kaj ties loĝantaro. Planataj estas vizitoj el diversaj vidpunktoj laŭ jena programo:

24-a de julio: vespere: alveno kaj interkonatiĝo.

25-a de julio: matene: enkonduko kaj teorio (el vidpunkto de kulturo, religio, politika administrado, geologio, faŭno kaj flaŭro: kun lumbildoj). Ĉ 11.00: Pertrajna ekskurso al Franches-Montagnes-Saignelégier-Etang de la Gruère en la ĵurasa kanton. Pikniko survoje. Konatiĝo kun la bela ĵurasa altebenaĵo kaj pitoreska lageto torfeja.

26-a: Industrio kaj metio: Perbusa ekskurso al Môtiers (NE), vizito de ties muzeoj pri ĉampano, pri kamparana vivo kaj pri Jean-Jacques Rousseau. Daŭrigo al Ste-Croix (kanton Vaud) kaj vizito de la fama muzeo pri aŭtomatoj.

27-a: Industrio kaj kulturo: Matene oni vizitos la faman internacian horloĝmuzeon en La Chaux-de-Fonds; posttagmeze oni trajne

veturos al La Sagne (NE), vizitos la tiean gotikan preĝejon kaj konatiĝos kun la kamparanaj domoj tipe ĵurasaj.

28-a: "Naturaj limoj": ekskurso al la svis-franca limregiono (Maison-Monsieur, la rasse Biaufond) ĉe la pitoreska rivero Doubs.

29-a: Naturo: ekskurso al la naturbelaja Creux-du-Van.

Kun vesperaj prelegaj, kulturaj kaj distraj aranĝoj; manĝado de fonduo kaj rakledo.

Se vi deziras daŭrigi vian malkovron de ĵuraso, tiukaze eblas aliĝi al la sekvanta kulturhistoria kaj turisma semajnfino.

SEMAJNFINO: 1994 julio 30-31

KULTURHISTORIA KAJ TURISMA SEMAJNFINO

KUN CLAUDE GACOND KAJ ANDY KÜNZLI (Svislando).

Dum la antaŭa kulturhistoria kaj turisma semajno oni konatiĝis kun la Ĵuraso svisa. Dum ĉi-tiu semajnfino oni malkovros la francan parton de tiu montaro. La trankvila mondo apartenanta al la regiono Franche-Comté (departemento Doubs, 25) estas ĝenerale sufiĉe nekonata al multaj turistoj kaj kulturŝatantoj. Sabate oni vizitos ravajn vidpunktojn ĉirkaŭ la rivero Doubs. Dimanĉe oni konatiĝos kun malnovaj preĝejoj kaj ĉarmaj vilaĝoj.

Sabate vespere oni komune manĝos rakledon aŭ fonduon (tipe svisa fromaĝmenuo kun blanka vino) en Kultura Centro Esperantista. Dimanĉe tagmeze oni piknikos survoje aŭ en restoracio.

1994 julio 31 - aŭgusto 5

PANORAMO DE SPIRITAJ MOVADOJ NUNTEMPE

kun **François DEGOUL** (Francio), instruisto pri la franca, latina kaj greka lingvoj kaj

beletroj.

I) Analizo kaj difino de bazaj konceptoj: Relegio, sinkretismo, spirito, esto, vero, paco, profeto, fido, neŭtraleco, kaj aliaj.

II) Tri kampoj de spirita renoviĝo.

a) Multiĝo kaj graviĝo de "privataj revelacioj" en Eŭropo (Fatima 1917, Ares 1974 k.a.

b) Islamaj fontoj: bahaismo kaj sufismo.

c) Orientaj sinkretismaj movadoj: Oomoto kaj aliaj.

III) Ĝeneralaj tendencoj.

a) Unuiĝo kaj paco.

b) Alvoko al spirita vivo kaj persona engaĝiĝo.

IV) Etika problemo: akordigi la personan identecon kun universalismo: la ekzemploj de L.L. Zamenhof kaj Edmond Privat.

oo0oo

korespond-DEZIRO de:

S-ro Vasilij Ribakov

Do vostre Bovanija

613100 Slobodskoj

Kirovskaja Oblastj (Rossija)

Mi estas 45-jara arbarkultura inĝeniero. Mi loĝas en antikva historia urbo. Antaŭ 12 jaroj mi esperantiĝis. Tre volonte mi korespondus kun Svisaj geesperantistoj. Mi ŝatas la naturon, fiŝadon, geografion kaj muzikon. Dankon jam antaŭe pro viaj leteroj.

oo0oo

TRE GRAVA KONVERSACIO

A.: "Ĉu vi jam kotizis al SES?"

B.: "Ho ve, tion mi tute forgesis! Dankon pro la memorigo!" Via kasisto

2-a INTERNACIA KULTURA KAJ TURISMA SEMAJNO

sub aŭspicio de Hispana Esperanto-Muzeo



15 - 22 okt. 1994

Adreso: ĉe Hispana Esperanta Fervoĵista Asocio
P.Kesto 15027, 08080 Barcelono, Katalunio
HISPANIO

Aliĝilo ricevebla ĉe SES INFORMAS:

- Red-

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
5.7.19.30 kaj 2.8.19.30h

ESPERANTORONDO BIELO:

CIUN VENDREDON EN RESTORACIO AMI, Freiestr.8
18.00-19.00h

ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:

ANTAŬ-ANONCO:

La REGIONA SEMAJNFINO DE SES EN Romandio okazos la 3-an kaj 4-an de septembro 1994 en Cully, proksime de Lausanne. La programo sekvos en SES INFORMAS 5/94. -NM-

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO

13.7.14.00-16.00 Paroliga kunveno en Big Ben. Gvido Franz Brügger.

16.7. (sabato) Ekskurseto al Rotkreuz, posttagmeze. Responsas Sonja Brun.

25.8.20.00h (ĵaŭdo) Literatura vespero. Ni daŭrigas la lastjaran rigardon al la evoluo de la Esperanto-Literaturo. Gvidos Sonja Brun.

ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL

Ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

ESPERANTOGRUPO WIL:

En restoracio Schweizerhof, Bahnhofstr. 18
6.7.20.00h Monata kunveno: "Kantado kaj ludoj.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

9.7. (Sabato) Ekskurso al ĝenevo. Renkontiĝo je la 0845h sub la granda horloĝo en la granda halo (renkontiĝa punkto)

Aŭgusto: Someraj ferioj.

AZB 8053 Zürich

PP/Journal 8053 Zürich

IMPRESSUM

Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
 Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
 Herstellungsort: Copy Quick Zürich. 6x im Jahr
 Red. Telefon 01/381 77 13

DEZIRO POR KORESPONDADO

Mia nomo estas:

Oksana Ellaslovskaja
 261613 Krasnopol
 Ĉudnovskij Jitomirskaja
 Stz Liadenko 19, Ukraino

Mi estas 23-jara. Tre volonte mi korespon-
 dus kun Svisaj gesamideanoj. Muziko, liter-
 raturo, poezio kaj aliaj temoj interesas
 min. Mi kolektas ankaŭ periodaĵojn el di-
 versaj landoj. **Kiu skribos al mi??**

oo0oo

G R A V A I N F O R M O**RADIO SUISSE ROMANDE LA PREMIÈRE**

dediĉos plenan horon al Esperanto. Tiu el-
 sendo okazos lunde la 8-an de aŭgusto 1994
 inter la 19.00 kaj la 20.00-a horo.

Ĉe la mikrofono sidos Mireille Grosjean kaj Claude
 Piron kiel gastoj de la ĵurnalistino Roselyne Fayard,
 -MG-

Limdato por kontribuaĵoj al **SES INFORMAS**
 4/94 estas la 8-a de aŭgusto 1994.